

Intervjuo kun Olivier Tzaut pri la disko Tra l' Mondo (2)

Radioprelego de Claude GACOND, SRI-1977-12-B-6-92

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1977-12/SRI-1977-12-B-6-92-Claude-Gacond-Intervjuo-kun-Olivier-Tzaut-pri-la-disko-Tra-l-Mondo.mp3>

Cl.- Parolas Claude Gacond.

Hodiaŭ vi aŭdas intervjuon kun la svisa kanzonisto Olivier Tzaut.

Olivier Tzaut, antaŭ unu monato ni anoncis la naskiĝon de via disko Tra l' Mondo. Ĉu vi povas fari la liston de viaj registritaj kanzonoj ?

OT.- Fakte estas du kanzonoj meksikaj, du usonaj, unu perua, unu slovaka, tri ciganaj rusaj kaj tri judaj el Ruslando kaj orienta Eŭropo. Jen ekzemple unu strofo de Sur stepo moldava: *(sonas la kanzono)*

Cl.- Ĉu vi faris komentarion pri ĉiu kanzono?

OT.- Ni estus volontaj, sed tiu tasko estas malfacila, ĉar se eĉ ĝi ampleksas kvar liniojn, tiuj supozigas iom longajn esplorojn. Fine, tio estis laboro plia kaj eble la plej delikata kaj longa. Pro tio ni rezignis kaj preferis indiki nur la devenon de la kanzonoj. Kiam mi diras „ni“, mi volas paroli pri Claude Piron, la tradukinto, kaj mi.

Cl.- Kaj nun ni aŭdu alispecan kanzonon.

OT.- Jes, se vi volas. Mi povas prezenti al vi usonan kanzonon tre fame konatan, kiu titoliĝas “Sixteen tons“, en la angla, kaj en Esperanto: “Dekses tunoj“. Tio estas ribela kanzono de usonaj ministoj, kiuj estis ekspluatataj de la kompanio, kiu laborigis ilin. *(sonas la kanzono)*

Cl.- Kio estas viaj projektoj, se tiu ĉi tre bela disko bone disvendiĝas ?

OT.- Jes, mi devos unue vidi ĉu ĝi bone vendiĝas aŭ estos nur por mi granda financa fiasko. Sed estas permesite revii, ĉu ne, tio neniom kostas. Do, mi revu kaj diru ke se tiu disko estos sukceso, Claude Piron kaj mi tre ŝatus doni al ĝi aliajn fratojn. Jen kelkaj ideoj. Disko kun originalaj kanzonoj en Esperanto, disko por infanoj, lulkantoj, popolkantoj aŭ tutsimple kantoj el Eŭropo aŭ el Ameriko, Azio aŭ Afriko. Kaj... ĉu mi rajtas proponi tion? Disko kun maldecaj kanzonoj, ĉar estas belegaj da ili. Sed, tio estas muziko por la estonteco. Nun estas unua disko vendota kaj grandaj ŝuldoj repagotaj.

Cl.- Kaj nun la kanzonon „Dum mi estis fraŭlo“. Mi scias ke vi multe ŝatas ĝin.

OT.- Jes, sed mi atentigas la geaŭskultantojn, ke tio tute ne estas persona geedziĝa sperto. *(sonas la kanzono)*

Cl.- Por konkludi?

OT.- Meksika festotaga kanzono: „Aŭdu jenan matenkanton“. *(sonas la kanzono)*

Cl.- Vi aŭdis intervjuon el Svislando pri la disko „Tra l' Mondo“ de Olivier Tzaut. Claude Gacond diras al vi: Ĝis reaŭdo!